

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75  
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 ore = 15 pfenigoj = 20 centimoj =  
8 kopekoj — por duonpaĝa petiltinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

---

III:a jaro.

Februaro 1898.

N:o 2 (26).

---

## Esperantistaro humana.

“Kredo sen la faroj malviva estas.”

La standardo de esperantistoj estas ornamita per multaj bonaj vortoj, inter kiuj staras ankaŭ la devizo “*amo kaj frateco inter ĉiuj homoj*” (nia himno “Espero”). Rigardante tiujn-ĉi vortojn oni devas konkludi ke la esperantistoj posedas la komunan simpation, ĉar oni ne povas ne ami la homon, kiu konfesas tiajn altajn principojn. Sed... la efektiveco ne jesigas tion plene. Ni havas, vere, la simpatiojn de certa parto de la societo, — sed la alia parto, ŝajne pli multenombra, rigardas nin tute malatente, kaj la tria, ankaŭ sufiĉe granda, nin mokas, — kolere, aŭ bonanime, — sed tamen mokas. Kial? ... Mi opinias, ke tio-ĉi devenas parte de tio, ke la homoj vidas, ke ni, skribintaj sur nia standardo tiom da bonaj devizoj (rig. ankaŭ la gazeton “Esperantisto” de 1895 jaro, N:o 2, la art. “Folieto de Posrednik”), en efektiveco laboradis ĝis nun nur por unu ideo, nome la ideo de la lingvo internacia, preskaŭ tute forgesinte la aliajn, kvazaŭ la homaro bezonas nur sole internacian lingvon. Oni povas rediri je tio, ke laborante por la ideo de la tutmonda lingvo, la esperantistoj samtempe laboras ankaŭ por la ideo de frateco kaj amo inter homoj. Ĝi estas ĝis certa grado vero, sed tiu-ĉi vero estas senduba nur por ni, t. e. por esperantistoj mem; por la aliaj-do homoj ni estas nur idealistoj, fremdaj al efektiva vivo de homoj kun iliaj mize-roj, malfeliĉoj k. t. p., kaj la homoj mokados nin, ĝis ili ekvidos, ke ni ne sole paroladas pri noblaj ideoj, sed ke ni ankaŭ per faroj aperigas nian amon kaj fratecon al la homaro kaj nian kompaton al tuta suferanta vivularo. Kiel tion-ĉi fari?... Laŭ mia opinio — jen kiel. Preskaŭ ĉiam en ia loko de l’ tera globo furiozas ia malfeliĉaĵo, tiel grandmezura kaj signifa, ke ĝi altiras la atenton de l’ tuta homaro, — kiel, ekzemple, la malsato en Hindujo. Kia homo, pli-malpli bonkora, povas trankvile legi la priskribojn de tiu-ĉi terura malfeliĉego, trankvile rigardi la figuraĵojn de tiuj-ĉi malsataj, nudaj homoj similaj al skeletoj, sed neniel al vivaj ekzistaĵoj — “reĝoj de l’ na-



turo“. Jen kie estas tute nobla kaj senfine vasta kampo por la konfesataj de ni humanaj ideoj.

Mi estas tre malproksima de la intenco instruadi la esperantistojn, ke ili devas oferi por la malfeliĉuloj, ĉar mi supozas, ke, kredeble, ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu esperantisto jam donis sian laŭfortan lepton, — sed li donis ĝin en eco de aparta privata persono, — kaj tial la bonaj aferoj, kvankam farataj *de la esperantistoj*, perdiĝas por la *esperantistaro*. Mi do nun deziras proponi al la esperantistoj, ke kiam iu el ili intencas doni monan oferon por ia, tutmonde-sciata malfeliĉaĵo, li proponu ankaŭ tion-ĉi fari al la aliaj esperantistoj per nia gazeto, kaj ni tiam faru la oferojn *kune*, de la nomo de tuta aro esperantista. Tute nebezone estas, ke ĉiu donu po multe; dezirinde nur estas, ke donu nepre *ĉiu*, kaj se ĉiu abonanto de “Lingvo Internacia“ donados en similaj okazoj kvankam po 20 kopekoj, — ni havos ĉiufoje la sumon preskaŭ en 100 rublojn, kiun jam ni povas nekontante sendi de la tuta esperantistaro. Ni agu tiel ĉiam kaj ni estu kvankam ne plej riĉaj, sed ĉiam la plej *unuaj* en la nombro de oferantoj, kaj tiam la moko malaperos, ĉar neniam honesta homo trovos en si la kuraĝon mokadi la homojn, kiuj ĉiam resoniĝas al ĉia bono, kaj resoniĝas ne per vortoj nur, sed per laŭfortaj faroj kaj donoj.

N. K.-G.

## Novajoj.

### Oferado kaj propagando.

Por la celo de nia gazeto “L. I.“ donacis s-ro V. L. kronojn 10, kiujn li ricevis de unu sveda gazeto kiel pago por unu artikolo ricevita per la helpo de Esperanto. Ni petas niajn amikojn en diversaj landoj peni en la sama maniero helpi al nia afero, sendante korespondaĵojn al alilandaj esperantistoj, kiuj eble volas uzi la enspezitan por la artikoloj monon tiel same.

\* \* \*

Por la *kapitalo de d:ro Zamenhof* oferis ankoraŭ: d:ro *Costa e Almeida* 2,500 rejsojn; *I. L. Puĉkovski* — 10 rublojn.

\* \* \*

### Nova vortaro sveda—esperanta.

Personoj kiuj deziras partopreni en la prilaborado de la nova svedesperanta vortaro volu sin turni letere al s-ro *A. Sandborg* (Uppsala) aŭ *V. Langlet* (Valla). — Estus ankaŭ dezirinde, ke personoj, kiuj povas kaj volas iel labori por la disvastigado de la estonta libro, volu skribi plej baldaŭ pri sia intenco al la Klubo Esperantista en Uppsala.

\* \* \*

*La lernolibro en Esperanto por svedoj*, de s-ro *P. Nylén*, estas jam forvendita. Nova eldono baldaŭ estos presata.

\* \* \*

El la 190 membroj de *I. C.* (Correspondance Internationale) la 1:an de jan. 1898 **57** estas esperantistoj aŭ publike anoncis sian deziron lerni esperanton.



Estas 22 francoj, 20 rusoj, 3 svedoj, 3 holandoj, 2 finlandoj, 2 portugaloj kaj po 1 italo, aŭstro, belgo, rumano kaj amerikano.

Ili portas en la nomaro la numerojn: 1, 3, 4, 8, 9, 10, 11, 12, 13, 14, 19, 24, 30, 32, 38, 40, 44, 46, 52, 55, 56, 57, 65, 67, 72, 73, 74, 75, 76, 77, 79, 80, 84, 87, 88, 90, 94, 97, 99, 100, 103, 104, 110, 114, 120, 122, 123, 127, 134, 136, 160, 162, 168, 170, 172, 176, 184.

\* \* \*

*La Klubo Esperantista en Uppsala* invitas ĉiujn svedajn esperantistojn (kaj eksterlandajn esperantistojn kiuj vojaĝas en Svedujo) fariĝi anoj de tiu klubo. La enskriba pago estas kr. 1:—; jarpago ne estas por personoj, kiuj loĝas ekster Uppsala.

\* \* \*

*Esperantistoj en Göteborg*, volontaĵi fondi klubon esperantistan, volu komunikiĝi kun *Gustaf Siösteen*, redakcio de *Handelstidningen*!

\* \* \*

**El S. Peterburgo** skribas al ni unu fervora amiko de nia lingvo, membro de "*Espero*":

"Nia societo ricevis kelkajn tre interesajn alilandajn leterojn, interalie de s:ro Geoghegan, kiu plendas ke jam ne ekzistas plu lernolibroj por angloj. Ni decidis antaŭ ĉio eldoni per la "Kapitalo Zamenhof" lernolibron por angloj. Kiel respondantan administratoron de tiu ĉi afero ni elektis s:ron Ostanieviĉ.

Pri nia societo *Espero* ni lokigis sufiĉe vastan artikolon en la granda jarlibro "*Ves Peterburg*" (Tuta Peterburgo), eldonita per la red. de "Novoje Vremja", kaj pri la lingvo Esperanto en "Eĵegodnik Jablonskaho". En du gazetoj ni presis anoncojn pri nia lingvo kaj societo. En "Novosti" s:ro Ostanieviĉ skribis artikolon, kaj s:ro Eĉinac en kelkaj aliaj gazetoj. Unu artikolon pri Esperanto, verkita de s:rino A. P. laŭ la peto de "Espero", ni donis al s:ro V. Korolenko, eldonanto de l' konata "Russkoje Bogatstvo", kiu estas favora al nia afero.

Novajn membrojn ni ĉiam akiras, inter kiuj kelkaj estas tre efikemaj. Kelkaj el ni nun konstante uzas ekzercan interparoladon en Esperanto. Por la nova jaro 1898 ni esperas povi plimultigi la nombron de niaj abonantoj de L. I.

Jam tri membroj de "Espero" forte intencas en la venonta somero vojaĝi en Svedujo per helpo de nia lingvo Esperanto."

\* \* \*

**El Stokholmo** skribas al ni konata Esperantistino fraŭlino M. F.:

"Mi ĉiam atendas, atendas, atendas... Kial oni ne deziras fondi klubon Esperantistan en Stokholm? En la pasinta somero estis ja ĉe ni plej brilanta okazo de efikado por nia lingvo; oni diras aŭ murmuras ke unu klubo fondiĝis. Tamen oni devas konfesi ke tiu ĉi klubo estas plej silenta en mondo, ŝajne konsistas el nur silentuloj! Ĉar ne eĉ unu vorton ĝi diris al la publiko. Ĝi eĉ konservas sian silentadon ĝis tia grado, ke ĝi ne respondas je leteroj direktitaj al ĝi. Nome mi en la pasinta somero, kiam pasigis ĉe mi rusa esperantistino kelkajn semajnojn, skribis al unu "fondanta membro" de tiu ĉi klubo kaj demandis pri adresoj de aliaj esperantistoj, kiuj eble dezirus konatiĝi kun mia rusa gasto — sed eĉ murmureton mi ne aŭdis, aŭ linieton mi ne vidis de tiu ĉi sinjoro.



Kaj tamen mi scias, ke en Stokholm vivas multaj, eĉ multegaj, virinoj konantaj nian lingvon kaj dezirantaj perfektigi en ĝi; kial do oni ne volas doni al ili helpan manon? Fondiĝo de klubo Esperantista en Stokholm estas necesega: ni nur serĉas la *virinon*. Ĉu li ne venos? Aŭ povas esti, la sinjoroj ne deziras helpi al la sinjorinoj en la afero de Esperanto. Tiam ili, eble, unu tagon estos surprizitaj per la fondiĝo de "La klubo esperantista de sinjorinoj" en Stokholm! Kaj tien *ili* ne estos enlasitaj."

\* \* \*

**El Portugalujo** unu amiko de nia afero skribas al ni en januaro:

"Pri Via peto labori speciale en la senco kreadi novajn agentojn kun celo precipe turista kaj informa en nia lando, mi devas diri al Vi, ke nia kara lingvo ne estas ankoraŭ sufiĉe disvastigata kaj konata en Portugalujo por ke mi povu sukcese labori en tiu senco; tamen mi faros kion mi povos.

Mia plej grava okupado nun estas finigi presadon de sufiĉe plena portugala lernolibro kiu mi esperas tute pretigi en la fino de la proksima monato. Tiam, per anoncoj en la ĉefaj gazetoj kaj dissendado de 500 propagandaj broŝuretoj mi esperas altiri kelkajn adeptojn al nia afero."

\* \* \*

**Pri Esperanto parolis:** En *Francujo* — "*Le Petit Dauphinois*", ĉiutaga gazeto en Grenoble, donas en sia n-ro 6175 tre simpatian por esperanto artikolon, titolitan: "Konferenco literatura kaj komerca pri la lingvo internacia Esperanto". La tiea Asocio de Komercio kaj Industrio decidis organizi kurson de lingvo komerca internacia kaj antaŭ ĝia komenco s-ro profesoro Emile Roux faros publikan konferencon pri Esperanto.

— En *Belgujo* jam "*Le Petit Bleu*" havas konstantan rubrikon "pour la langue universelle" (por la lingvo internacia). En la n-ro 26, 1898 oni anoncas pri la komenco de Esperanta kurso, donata de s-ro Blanjean en la Bruksela "Cercle polyglotte" (rondo multlingva), kaj pri la kondiĉoj por partopreni en tiu kurso. La enhavo de tiu ĉi artikolo estas multe esperiga. — La taggazeto "*L'Etoile*" en Brukselo presis malgrandan artikoleton pri la parolado de s-ro Ch. Lemaire ĉe la Klubo ĉiulingva.

— En *svedaj* gazetoj oni vidis malgrandan, ĉefe ŝercan noteton pri "ia nova lingvo universala", kiu ne estas volapük nek "*la forte disvastiganta esperanto*", sed ia kvazaŭmuzika. — En la granda duoble ĉiutaga sveda gazeto *Stockholms Dagblad* n-ro 554, 1897 estas presita artikolo pri la superakvado en Peterburg kun la sciigo ke la artikolo estas tradukita el Esperanto. — La sama artikolo estas presita ankaŭ en la Milana gazeto *Lega Lombarda* kaj en la portugala *O comercio do Porto*, kun konforma sciigo.



## Ankoraŭ pri unu vojaĝo Esperanta.

Se Esperanto ne ekzistus, kaj se mi mem ne estus esperantisto, certe mi ne farus tiun vojaĝon kiun mi sukcesis fari en pasinta somero. Estas ankaŭ certa, ke similon diros preskaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj-turistoj, kies nombro bedaŭrinde ne estas ankoraŭ granda. Diritan vojaĝon mi intencadis ankoraŭ en 1896:a, kaj faris tiam celemajn anoncojn en L. I. kaj Etranger. Tiuj publikiĝoj ne restis senrespondaj; ne, ili profitigis min je amindaj revokoj de kelkaj bonemaj personoj, kiuj tuj proponis al mi ilian helpon; ĝis nun mi ĝuas ankoraŭ je korespondado kun kelkaj el ili. Tiun ĉi jaron mi estis ankoraŭ pli kuraĝa: preparante mian ekskurson mi ĵetis en Finnlandon, kiu unua kuŝis sur mia vojo, sep leterojn al personoj kies nomojn mi trovis kiel abonantoj en L. I. De ses el ili mi ricevis favoregajn respondojn; ne konantaj min homoj nomis sin pretaj min helpi, honoris min je ilia invito kaj de-



ziro havi min kiel gaston... Mia koro pleniĝis je danko, kaj la efektivo de miaj vojaĝaj planoj estis decidita.

Pluaj miaj preparoj por ekskurso konsistis en tio ke mi: 1) petis la klubon Upsalan honorigi min per anigo inter siaj membroj; 2) entiris en ĝi (la ekskurso) kompanianon, d-ron S. turiston spertulan, kun sia velocipedo jam vizitintan Krimon, Kaŭkazon, Novgorodan ekspozicion kaj cet.; (bedaŭrinde nur ne fortan esperantiston) kaj 3) — mi faris kelkajn ekprovojn ĉe miaj novaj finnaj korespondanoj efektiviĝi eldonon de malgranda radikvortareto esper.-finna, kiun mi supozis helpontan por nia vojaĝado. En mia nescio mi pensis, ke tiu entrepreno eblas esti farota en daŭro de ia monato, sed homoj sciantaj decertigis min je tiel rapida plenumbleco de mia deziro, kaj dirita vortareto restis en ujo de bonaj intencoj. Tamen, kiel homo zorgema pri harmonio inter parolo kaj faro, mi profitas je tiu ĉi okazo por konigi, ke mi ne rifuziĝas de la propono farita, t. e. ke la elspezojn de la presigo de malgranda vortareto esperanta-finna (vortareto fundamenta) mi restas preta preni sur min... Malprospera ankaŭ estis mia alia deziro, kvankam multe pli modesta, t. e. havi tiajn samajn vortaretojn por lingvoj sveda kaj germana por celoj de propagando. Mi adresiĝis kun tiu ĉi bezono al s-ro Zamenhof, sed li ne povis min kontentigi; tiuj vortaretoj ne estas akireblaj, ĉar ili ne ekzistas plu. Mi pensis, ke malhavo de malgrandaj vortaretoj, enmeteblaj en letero, konsistigas mankon de ilo tre utila. En ŝanĝo mi ricevis de la klubo Upsala tutan provizaron da vortaroj svedaj — verko de s-ro P. Nylén — kompreneble mi povis preni kun mi nur malmultajn, limigemante poveble mian pakadon.

Ne longe antaŭ la komenco de nia vojaĝo mi ricevis leteron de s-ro V. el Peterburgo, sciigantan pri lia deziro aliĝi al nia ekskurso. Mi multe ĝojis je tio; poste montriĝis ke s. V. per sia lingvo Esta (lia patrolingvo) estis por ni, kaj speciale por mi, treege utila.

Mi elveturis la 12:an de Junio, du tagoj pli frue ol s-ro S., ĉar mi volis viziti laŭvoje grafon L. Tolstoj en lia vilaĝbieno (Jasnaja Poljana, proksime de Tula). Mi pasigis du vesperojn en lia agrablega familio, kiun mi lasas ĉiufoje kun plej bonaj memoroj.

En Peterburgo ni haltis pli longe ol ni projektis: s-ro V. estis for, kaj ni atendis lin vane plendante lian neakuratecon. La haltigo estis aparte malagraba por S. kies libertempo, kiel de ofica kuracisto, estis limigita nur je unu monato. Ni finis per tio ke, konsuminte nian paciencon kaj forĵetinte pluan atendon, ni elveturis el Peterburgo duope, la 22:an de Junio. V. aliĝis al ni pli malfrue, nur la 1:an de Julio, en Helsingfors. Ni avizadis lin pri nia tramovo per telegramoj, kaj kredeble tio estis por unua fojo ke finnaj telegraffadenoj portis parolon Esperantan\*).

Pli ol 1600 kilometrojn faris ni tra Finnlando, uzante precipe velocipedon. Mi ne priskribos tie ĉi diversajn detalojn de nia vojo, kiuj kompreneble ne estis gravaj. Alligante mian nunan diron speciale al temoj Esperantaj, mi limiĝos nur per atesto, ke ni havis belegan ekskurson, kaj ke mi forportis en mia animo belajn pentraĵojn de la Finnuloj. Mi vidas ilin iafoje en miaj songoj. Ĉiam mi memorados silentajn arbarojn finnajn, malproksimajn, vastajn lagojn, lumetajn noktojn kun ilia nerompata malbruo: Abioj prezentas sin egale klare

\*) Tute ne! Inter Svedujo kaj Rusujo, tra Finnlando, oni kelkfoje, kun bona sukceso, telegrafis en Esperanto.



sur la hela fono de ĉielo kaj transturnitaj en spegulo de akvoj. En horo noktmeza, inter arbaro, mi legis leteron. En nia ekskurso al Punkaharju ni velocipedis tra tuta nokto, kaj tuta nokto pasadis antaŭ ni en sia trankvila grandeco. Memoriĝas al mi ankaŭ alia nokto: Ni malfruis kaj rapidis por noktpasigo en Suomenjemi, vilaĝo inter Vilmanstrand kaj S. Mikel. La vojo alkondukis nin al bordo de lago, ĝuste al akvo mem. Ni lasis niajn velocipedojn kaj suriris sur grandegan ŝtonon kuŝantan en akvo simile al ŝtonigita baleno. Ni lavis niajn vizaĝojn varmegitajn per rapida kuro, kontentigis nian soifon, kaj miradis je beleco de la pentraĵo senmova, kiu paroladis al animo pri ia eterna ripozo... Jes, mi ĉiam memorados vin, Finnulo, kun viaj longegaj, afablaj someraj tagoj, rapide pasadantaj noktoj, kun viaj beletaj malgrandaj urbetoj, kiujn oni lasas tuj poste si per kelkaj pedalfrapoj velocipedaj, kun viaj bonkutimaj landanoj, kaj boneteco kaj ordemeco de tuta via vivo... Mi bedaŭras nur ke en vi ekzistas ne sufiĉe granda nombro da esperantistoj. Ili farus vojaĝojn en vi ankoraŭ pli al'tirantaj... Mi esperas, ke tra nelonga tempo en ĉiuj urboj finnaj naskiĝu Esperantaj rondetoj, en kiuj fremda vojaĝisto trovos nefremdan saluton kaj amikan akcepton, kiel tio okazis al ni.

Ni vizitis sekvantajn urbojn: Viborg, certe sen forlasi pason al akvofalo Imatra, Vilmanstrand, S. Mikel, Kuopio, Nyslott, denove Vilmanstrand (ĉiam serĉante s-ron *V.*), Helsingfors, ĉiujn loketojn sur la vojo Helsingfors—Abo, kaj Abo'n mem. En Viborg ni mankis viziti esperantiston s-ron *H. B.* ĉar tie ni pasigis nur kelkajn horojn da vespero kaj la nokton. En Vilmanstrand ni ne trovis esperantistojn, sed provis ĵeti tie semajon Esperantan: S-ro *K.* rilatis sin favore al kelkaj klarigadoj donitaj per mi pri tiu ĉi granda elpenŝaĵo, kaj mi multe ĝojus ekscii, ke la semoj falis sur bonan teron... En S. Mikel esperantanoj mankas. En Kuopio ni unue ekirigis parolon Esperantan, sed tie ĝi ne ludis notindan rolon, ĉar s-ro *M. N.* akceptinta nin, posedas bonege lingvon rusan. En Nyslott ankaŭ ni ne trovis esperantanon; en Helsingfors kredeble ni povus tiajn trovi, sed renkonto tute okaza kun unu familio rusa fortiris nin tute alian flankon... De Helsingfors ĝis Abo ni velocipedis jam triope, ĉar fine ni kuniĝis kun *V.*, kaj de tiam mi komencis interŝanĝi kun li frazojn Esperantajn en celo de praktikado (ĝis tiam mi neniam provis uzi Esp. buŝe); ni penadis entiri en nian paroladon d-ron *S.*, sed li rilatis al nia babilado fiere. Por instruo de rusaj vojaĝontoj en Finnulo mi diros tie ĉi, ke ili ne devas meti grandan esperon sur la l. rusa. Oni renkontas ĝin ne malofte en proksimaĵo de Peterburgo, en Viborg kaj iafoje en urbaj hoteloj; en vilaĝoj ĝi malaperas plene. Per tio ni ofte kaj perfekte similadis surdmutulojn. Mia kompaniano d-ro *S.* preparinte sin por ekskurso penis lerni kelkan aron da terminoj finnaj, sed utilo de tia lerno montris sin preskaŭ nula. Nia apogo en tiu ĉi rilato estis s-ro *V.* kun sia esta l. Li estis komprenadata, kvankam ne ĉiam kaj ne facile. En unu tre "drola" kvankam por mi tre grava okazo *V.* eĉ aperis mia vera savulo: Pro mia ekstrema distreco mi forgesis meti en mian velocipedvalizeton mian surtuteton kiun mi devestis por pli libere velocipedi. La vesto restis lasita sur voja ĉirkaŭbarileto, kaj mi ekrimarkis la mankon nur veninte stacion spacitan en 22 kilometroj de la fatala loko. Ĉu vi povas imagi mian teruron?! Kaj la tempo estis jam tre proksima al nokto; ni jam faris en tiu ĉi tago pli ol cent kilometroj kaj mi estis lacetita... Komprenigi mian mizeron al staciestro, dungi veturiston por iri al serĉado, kaj pli malfrue uzi tiun silentegan veturiston



kiel tradukanto kun landanoj, kiujn ni maltrankviligis en mezo de nokto... ĉio tio estis por mi atingebla nur danke al s-ro V. Sen li mi pereus. Tio okazis en 90 kilometroj de Åbo.

Nur en Åbo Esperanto fine eniris en siajn verajn rajtojn kaj signifon. Tie ni trovis du jam *pretajn* esperantistojn, esperantistojn "comme il faut", s-rojn G. R. kaj R. N. kiuj alvelocipedis Åbon speciale por koniĝi kun ni kaj fari nian estadon tie pli agrabla. Ambaŭ parolas Esp. facile, aparte s-ro N. Aŭdante lian fluan paroladon, nia d-ro S. ekkredis fine la potencon de la l. intern. kaj devis konfesi ke anstataŭ parkeri deŝiritan terminaron finnan, li farus pli bone ekzerci sin pli en pli uzebla lingvo-sistemo.

Ni pasigis en Åbo kvar tagojn, ne nur pro s-roj R. kaj N., sed ankaŭ pro ĝentila gastameco de la aminda kaj afabla familio B., kiu akceptis nin kiel oni ne akceptas *fremdajn* vojaĝantojn. Ni faris ankaŭ viziton al s-ro R., egale esperantano, sed ne havis plezuron trovi lin hejme.

La Åbo'a vizito finigis inde nian belan vojaĝon Finnujan. Ni vidis en tiu ĉi urbo ĉion notindan, akompanataj je klarigo de niaj novaj amikoj (decide neniam mi havis gvidantojn pli agrablajn) ni faris ekskurson en Nådendal, ni gastis en vilaĝdomo de gesinjoroj B. kie efektiviĝis en malgranda mezuro vera kunveno internacia. Lingvoj sveda, germana, franca, rusa, Esperanta, finna kaj esta sonadis kaj miksiĝadis samtempe kaj egalrajte. Parolado komencita en unu lingvo ofte estis finigata per konfuzita oratoro en alia, kaj vere oni povis imagi sin ĉe la subpiedo de la turo Babilona... Estas neduba, ke mi lasis Åbon ankoraŭ pli fortikita en mia amo al Esperanto kaj ankaŭ al tiuj, kiujn mi ekkonis danke al ĝi (vidu unuajn liniojn de tiu ĉi letero)... Kiel ĝoja estus mi, se mi certigus, ke la membroj de la kara familio B., kiel ankaŭ s-ro B., akompaninta nin en Stockholm, gardus al la l. intern. favoron, kiun ili ete aperigis! kiel ĝoja estus mi vidi iliajn nomojn en vico de konfesitaj, sinceraj defendistoj de la ideo Esperanta!

La 8-an de Julio ni forlasis gastaman Åbon, kaj veturis Stokholmon, kie nia kompanio ete dividiĝis... Ok tagojn pasigis mi en Svedujo, kaj tuj konfesas, ke mia estado tie ne povas esti nomita sukcesa en rilato de kuniĝo kun svedaj esperantistoj. Kaŭzoj por tio estas du: 1:a estas ke mi falis en kompanion de mia parenco, kio multe ĝenadis la liberon de mia agado; 2:an konsistigis la sezono, pro kiu ĉiuj Stokholmaj esperantistoj estis for la urbo. Mi trovis tie nur s-ron A. kiu dediĉis al mi tutan tagon, pasigitan precipe en la ekspozicio. Mi havis tutan nomaron de personoj, kiujn mi povis viziti (donitan al mi per s-ro V. L.) kaj neniun por konduki min al ili; vojaĝi sola mi ne kuraĝis en lando, kies lingvon mi tute ne scias. Tielmaniere mia enpenetro en Svedujo ege ne estis tiom sukcesa kaj utila, kiel tiu de s-ro Kazi-Girej, farita en sama jaro. La depago al rilatoj parencaj rabis de mi la ĉefan mason da tempo, alian deprenis la ekspozicio, kiun certe oni devis vizitadi. Tamen ankaŭ mi havis en honoron de Esperanto unu bonan tagon, tagon de mia veturo en Upsala (15:a de Julio). Mi venis tien atendita per du nekonataj amikoj Esperantaj s-roj K. H. kaj A. S. Kun ili mi pasigis tutan tagon vizitante vidindaĵojn Upsalajn, tiean belan katedralon kaj universitatejon. La grandioza ronda salonego de la lasta impresis min multe kiel arĥitektiston. Laciginte miajn novajn amikojn mi forlasadis ilin ankoraŭ antaŭ vespero; mi diris jam adiaŭ al ili kaj eniris en vagonon, kiam mi subite ekaŭdis denove iliajn voĉojn: "haltu, haltu, sinjoro!" Montriĝis ke en tia sama vagonaro estis s-ro V. L. ĵus reveninta el lia norda vojaĝo. Mi pasigis ankoraŭ



du horojn en hejmo de unu el plej agemaj defendantoj de la esperantismo, kun kiu mi jam havis sufiĉe da komunaj konatoj. Nia korespondado komencis ankoraŭ antaŭ unu jaro. Kun s-ro L., nelacebla en liaj vojaĝoj, mi kondiĉis renkontiĝi ankoraŭ unu fojon en sama jaro, en Rusujo (kio estis efektivigita) kaj promesis ne lasi unu alian sen sciigoj... Mi diras ankoraŭ finan adiaŭ al miaj afablaj mastroj, kaj forlasas Upsalan por, unu tago pli poste, forlasi ankaŭ Svedujon mem... Ĉu okazos al mi vidi ĝin ankoraŭ unu fojon en mia vivo?

Mi revenis mare, rekte Peterburgon, kun nelongaj haltoj: en Åbo (adiaŭ de la bordo de vaporŝipo al aminda familio B., kiun mi vidis kunigitan sur la teraso de ilia *villa*. S-ro V. estis vidata ankaŭ, kun sia blanka ĉapeto); en Hangö (belega luna nokto, kiun mi tutegan pasigis en irado en ĉirkaŭaĵoj de tiu ĉi eleganta urbeto); en Helsingfors, Viborg... Mi estis denove en mia patrolando. Tamen mi daŭrigis plue mian vojaĝadon, vizitinte velocipede Luga'n, maljunan Novgorod, ankaŭ unu fojon Jasnaja'n Poljana'n. Mi revenis mian domon nur 10:an de Aŭgusto. D-ro S. trovis sin hejme jam pli ol dum unu monato.

Mi devas ankoraŭ diri ion pri miaj impresoj pure Esperantaj, ĉar ekprovi unue lingvon artan en buŝa komunikiĝo kun alilandanoj estis unu el miaj celoj. (Bedaŭrinde mi ne preparis min sufiĉe bone por tia celo). Ripeti, ke Esperanto povas servi al tio kiel bonega, oportunega, p. t. d. *poŝa* rimedo, estus eĉ superflua. Oni devas posedi nenian plej malgrandan talentecon por uzi Esp. buŝe en parolado ordinara post tre nelonga ekzercado. Mi mem montris min malbone parolanta, t. e. mi ne estis en stato konduki ligitan fluan rakontadon. Kaŭzo al tio estas ne sole en manko de antaŭa praktikado (vere, mi alkuras al Esp. tre malofte, kaj neniam buŝe) sed ankaŭ en mia netrovuleco, kiu malhelpas al mi uzi parole ian lingvon el tiuj, kiujn mi lernis. En revenĝo mi koniĝis kun kvin personoj, kiuj uzas Esp. nekompareble pli facile ol mi. Uzante Esp. komence oni ege ne devas paroli rapide, sed kontraŭe tre malrapide. Tuj ke mi forgesadis tiun regulon, mi faradis multnombrajn erarojn, miksadis tempojn, mankadis al kazo akuzativa, ne diversiĝadis *j* kaj *ĝ*. Kun tio oni devas eble klare diversiĝi similajn sonojn, kaj vokalojn *o* kaj *a*, kion rusoj estas tre emaj manki. Tial mi plene konsentas al tio kion diras s-ro Reiner en n-ro 8—9 de la L. I. de 1897, t. e. mi konsentas al la defendo uzi finojn *oj* kaj *aj* kaj cet. kiel rimoj, kvankam mia orelo, kiel tia de ruso, allasas facile tian rimadon. Komune, de kiam ni irigis en faro Esperanton buŝe, klareco kaj reguleco de elparolado aperas postulo grava kaj deviga por ĉiuj. En revenĝo mi tute ne estas partiano de diversaj kondiĉaĵoj en uzo de la lingvo intern. Mi defendas plenan liberon en tiu uzo, limigitan nur per leĝoj de logiko kaj per reguloj jam donitaj. Ĉiuj formoj, kiuj ne malhelpas komprenon, estas, laŭ mi, allasitaj.

Kiom da plezuro oni trovas — aŭdi fremdulon transmeti en lingvo neŭtra, ĉiŝalirebla, sian parolon tiel kiel ĝi naskas en lia patrolingvo! Kiom estas grava havi por tiu transmeto tutan necesan materialon! La grandeco de la merito de Esperanto, la genieco de lia koncepto konsistas en tio ke en ĝia konstruado estas metita per la aŭtoro kvazaŭ matematika, por tiel diri, *algebra* fundamento. De kiam principo matematika estas fortike starigita, sistemo arta fariĝas sistemo scienca. Ĉu posedas Esperanto ĉion tion, kio donus al ĝi rajton nomi sin sistemo konstruita escepte sur principo escepte logika? Ŝajnas al mi — preskaŭ, sed ne tute. Mi ĉiam deziris ke Esp. ricevu tion



kio al ĝi mankas t. e.: pli fortan internan ligan en lia vortaro radika kaj produktelebla, kaj, eble, novajn signojn por pli fleksebla vortformigo. (Nur pensu kian potencon ilon havas ni ekzemple en parteto *ig*, aŭ *ec*, aŭ *ebi*!) Ĉu tia temo estas atingebla? Levante tian demandon, mi neniel pretendas solvi ĝin. Mi atendas respondon de tiuj laboremaj kaj lertaj tradukistoj el diversaj lingvoj, kiuj jam faris en tiu ĉi ujo grandan faron. Ili devas jam havi vastan kolekton da materialo por tiu ĉi respondo.

Lingvo estas prudento objektigita (mi ne memoras de kiu mi prenas tiun ĉi bonegan difinon), kaj se estas taŭga fari novajn provojn de tia objektigado, tiuj provoj certe devas disiĝi de ĉiuj tiuj, de la logiko forirantaj konstruaĵoj, kiuj anstataŭ celi pluan sistemigadon, klinas nur al falsigado de lingvoj... Tial mi sen aprobo rigardas similajn spertojn faratajn en la "Linguist". Se estas sortita ke ni paŝos pli antaŭe ol Esperanto, kiun posedis ni jam havas feliĉon, la paŝoj, ŝajnas al mi, devas esti farotaj en alia direkto, nome en direkto *pure Esperanta*.  
A. Z.



## Kelkaj vortoj pri la ekspozicio en Parizo en 1900 jaro.

Sendube multaj el niaj legantoj scias, ke en la 1900 jaro en Parizo estos tutmonda ekspozicio. Tiun ĉi ekspozicion, laŭ mia opinio, devas uzigi ĉiuj amikoj de Esperanto por propagandado de nia kara lingvo.

Kvankam Esperanto jam komencas iom post iom atingi sian celon, tamen estas ankoraŭ multegaj homoj, kiuj ne komprenas kaj ne volas kompreni la utilon de Esperanto, kiel lingvo internacia.

Per kia do maniero konverti tiujn ĉi nekredantulojn en "la veran vojon?" Mi pensas, ke per la sekvanta maniero oni povas fari tion ĉi: aranĝi en la Pariza ekspozicio apartan oficejon de Esperantistoj, kolektigi tien ĉi laŭ ĉebleco prezentantojn de Esperanto de ĉiuj landoj de l' mondo.

Tiuj ĉi personoj povus memafere montri al ĉiuj, kiel facile popoloj de plej diversaj landoj povas komprenadi unu alian kaj interŝanĝadi siajn impresojn. Krom tio estus tre bone se oni povus legi en la ekspozicio parolojn pri la Esperanto, ĝiaj celoj, sukcesoj k. c. Tie ĉi ankaŭ devas esti lernolibroj de Esperanto kaj aliaj libroj. (Ankaŭ bone estus havi en granda nombro "propagandajn broŝurojn" por senpaga disdonado).

Por plenumi tiun ĉi grandegan entreprenon sendube oni devos elspezi sufiĉe grandan sumon da mono, do mi konsilas al amikoj-esperantistoj oferadi por tio ĉi kiu kion povas; la rusa proverbo parolas: "*se ĉiu donas po unu fadeno, oni ricevos la ĉemizon por nudo*", — tiun ĉi proverbon ni povas almeti al nia entrepreno. Krom tio se ni rimarkos, ke nun nur komenciĝas la 1898 jaro, sekve ĝis la ekspozicio restas ankoraŭ du jaroj kaj se ĉiu esperantisto decidus oferadi por tiu ĉi celo kvankam ĉiumonate 5 kopekojn, do li unu oferos en du jarojn 1 rubl. 20 kop. Se ni trovos tiajn personojn nur 500 (mi parolas pri abonantoj de "L. I."), eĉ tiam ni ricevos la sumon de 600 rubloj. Sed mi pensas, ke inter niaj amikoj troviĝos tiaj personoj, kiuj povos oferadi ĉiumonate pli grandan sumon, ol 5 kop. — tiam ni facile povos ricevi sumon de 1,000 rubloj. Kvankam eĉ tiu ĉi sumo ne estas tre granda, tamen ĝi povas alporti grandan komplezon por nia celo.



La oferojn oni povas sendadi al agentoj, kiuj du fojojn ĉiujare desendados la oferitan sumon al unu ia pli aŭ malpli konata al niaj amikoj persono aŭ societo de propagandado de Esperanto.

Eble multaj ne aprobos pro diversaj kaŭzoj tiun ĉi mian proponon? Eble iu povas fari pli bonan proponon? Mi do ne povas elpensi pli bonan rimedon de propagandado de Esperanto en la Pariza ekspozicio, ol tiu ĉi.

De 1898 jaro, 10 de januaro.

Kun kora internacia saluto

agento de la lingvo internacia Esperanto

P. F. Jaroslavec, Jaroslavl.



## Internacia ligo stenografiista.

La sveda stenografia gazeto "Hermes" redonas en unu sia numero paroladon de sinjorino Jetta Lundgren pri "internacieco en la regionoj de l' stenografio", havitan en la stenografia kongreso en Stokholmo.

Jen la enhavo de tiu parolado, laŭ "Hermes":

La stenografia movado disvolviĝadis malegale en diversaj landoj, kaj ni ĉiuj povas ion lerni unu de alia. De tiu ĉi punkto de vidado havas sian grandan signifon la internacia kongreso. Sed ankaŭ per aliaj manieroj povas reciproke interkomunikiĝi la stenografiistoj de diversaj landoj. Internacia biblioteko stenografia, kie stenografiistoj el ĉiuj landoj povus prunte ricevadi librojn, estas unu tiela rimedo; internacia stenografia gazeto kun artikoloj el malsamaj landoj estas alia ne malpli grava rimedo. Kiel oni povus atingi tiujn ĉi deziro-celojn, la parolintino ne volis montri, ŝi volis nur alĵeti la penson mem. Oni povos ja poste pli detale pripensi ĝin en la stenografia preso. Ĉe tia pripensado sendube aperos ebleco superi la ekonomiajn malfacilaĵojn, kiuj kontraŭstaras la efektivigon de la intenco.

.En la diskusio, kiu sekvis la paroladon, sinjoro Max Bäckler el Berlin, redaktoro de "Magazin für Stenographie" kaj estro de la ĉefligo stenografia Stolzeana kaj de la oficejo stenografia de "Kölnische Zeitung", parolis simpatie koncerne la almetita propono kaj aldonis ankoraŭ unu novan proponon pri *fondigo de internacia stenografiista ligo*. Grandaj kaj eble nesupereblaj ekonomiaj malhelpaĵoj tamen estus ekstarigontaj kontraŭ la efektivigo de la ideo de sinjorino Lundgren, eble tamen internacia ligo povos pliproksimigi al sia efektiviĝo la projekton. En sekvanta internacia stenografikongreso li esperas, diris li, ree trovi tiujn ĉi aferojn sur la programo. —

Tiom la citita gazeto. Post du jaroj la sekvanta stenografikongreso havos lokon en Parizo dum la granda tiea ekspozicio. Pro tio mi turnas min al ĉiuj stenografiistoj kaj amikoj de la stenografio en la tuta esperantista mondo kun la sekvanta propono: *ni senprokraste organizu internacian ligon stenografistan kun internacia stenografia gazeto, por ke ni en la kongreso povu montri la jam plenumitan fakton*. Mi ne pensas, ke la ekonomiaj malfacilaĵoj estas nesupereblaj. Komence oni povos ja tre modeste eldonadi skribitan gazeton presitan per mimeografilo.

Mi nun ne volas trouzi nian gazeton per meditadoj pri detaloj de la projekto, nur humile petas ĉiujn stenografianojn, kiuj legas nian gazeton, ke ili plej baldaŭ skribe sciigu min pri sia opinio koncerne tiu ĉi mia propono. Pri la rezultato mi kiel eble plej baldaŭ raportos en "Lingvo Internacia".



Mi pensas ke mi apenaŭ bezonas motivi mian proponon. Ĉiu komprenas la signifon de projekto, kies celo estas kunigi ĉiujn sam-metianojn en la tuta mondo en unu vastan asociacion por ke per komuna lingvo — la lingvo de l' estonteco — kune efkadi por komuna celo — la skribo de l' estonteco.

Kontraŭ la efektivigo de tiu ĉi projekto oni vidas nur *unu* malamikon — unu, sed leono! — la indiferentismo.

**P. Ahlberg.**

Adr.: 50 Döbelnsgatan, Stockholm, Svedujo.



## Radio de Amo.

Fantazio.

(Dediĉita al memoro de *Jozef Wasniewski*).

Estis bela somera nokto. Kiel grandegaj juvelaj ŝtonoj sur nigra veluro, brilis diverskoloraj steloj en nokta ĉielo. Tero, varmigita per fajraj kisoj de suno, nun ripozis, tra dormeto murmurante vortojn de amo al foririnta lumo. Kun tiu ĉi murmuro miksiĝis odoro de floroj, flugado de noktaj birdoj kaj papilioj, movado de fantomoj, murmuro de feliĉo kaj ekspiroj de malĝojo...

Kaj tiu ĉi brueto, kune kun plaŭdado de maraj ondoj kiel rava harmonia akordo, flugis al nokta ĉielo, nigra kaj trankvila, mistere rigardanta teron per siaj sennombraj okuloj-steloj.

Kaj subite...

Kies terura krio de netolerebla malespero rompis tiun ĉi solenan himnon de nokto? Se mara ondo povus atingi altan pinton de surborda ŝtonego, -- ĝi ekvidus tie solan figuron de homo, de bela forta junulo, kiu en sufero kaj malespero ploregis, rompante siajn manojn, kaj laŭte vokis al ĉielo, kva-zaŭ esperante, ke ĉielo ne restos surda por liaj petegoj.

Kaj ĉielo aŭdis. Subite tra nigra mallumo ekbrilis ia ora radio kaj antaŭ okuloj de junulo aperis radiluma genio kun grandaj brilantajflugiloj, kiu per severa voĉo demandis lin:

— Kiu vi estas, arogantulo, ke vi kuraĝas per via plorego nebuligi belan solenan himnon, kiun kantas nokto, glorante Diecon? Pri kio estas viaj lar-moj? Ĉu vi ne vidas misteran stelaron, kiu tiel belege lumas en ĉielo? Ĉu vi ne flaras ravan odoron de floroj, ĉu vi ne aŭdas vortojn de amo, kiujn murmuris tero, ĵus karesita per suno?

— Ne! respondis junulo. — Miaj oreloj aŭdas nur aliajn sonojn, sonojn de sufero, de malĝojo, de mizero... Ili tiel klare diras al mi, ke en tiu ĉi belega nokto ekzistas miloj da homoj, malfeliĉaj, sopirantaj, kiuj falas ven-kitaj en batalo kun kruela sufero kaj mizero. Kaj mi ploras pro kompato, kaj mia malespero estas pro kompato, kaj mia malespero estas pro tio, ke mi ne povas helpi al ili...

Longe kaj atente rigardis genio en okulojn de homo kaj fine diris:

— Vi havas bonan koron, junulo. Kaj mi donos al vi rimedon, per kiu vi havos eblecon konsoladi kaj helpadi ĉiujn malfeliĉulojn kaj mizerulojn. En via koro brilas fajrero, kiun mi ekbruligos per tiu ĉi ora radio de amo kaj per ĝi vi povos varmigi ĉiujn kaj ĉion, kion vi volos. Sed sciu: vi iros tute sola en mondo, renkontante nenies parencon por vi animon. Homoj venados al vi por preni parteton de varma amo el via koro kaj, varmigita,



ili foriros; multaj eĉ forgesos vin. Aliaj, kiuj ne bezonos vian konsolon kaj helpon — mokos vin kaj insultados. Kaj kun ĉiu parteto de amo, kiun vi donos al homoj, el via koro elfalos unu guto da vivo; kaj via koro fariĝos vundita, sangita kaj forte doloros en sufero de soleco — dum ne elfalos el ĝi *lasta* guto de vivo kaj amo kaj ĝi ripozos tiam en malvarma dormo de morto. Num vi scias ĉion, kio atendas vin; konsideru do bone kaj diru al mi, ĉu restis via deziro konsoladi suferantojn?

— Ho, jes! ekkriis junulo en ravo: — fari bonon al ĉiuj aliaj kaj mem suferi — ĉu ekzistas pli granda feliĉo?

Tiam genio prenis oran radion kaj enmetis ĝin en koron de junulo. Kaj li eksentis kiel varme kaj forte ekbatigis lia koro, liaj okuloj ekvidis belegan stelaron, li ekflaris ravan odoron de floroj, ekaŭdis murmuron de tera amo, kaj kune kun noktaj fantomoj kaj forfluganta radiluma genio li ekkantis miŝteran himnon, glorantan Diecon...

\* \* \*

Pasis tagoj, monatoj, jaroj... Junulo jam fariĝis viro, li havis familion, amikojn, konatojn, — sed ĉiuj estis fremdaj por lia animo, ĉar neniu povis kompreni lian koron, en kiu brilis tia varma ora radio kaj kiu tiel forte doloris, kiam el ĝi gutis ruĝa varma guteto de lia vivo.

Multaj homoj venadis al li por plendi pri sia malfeliĉo, sufero, mizero aŭ simpla ĉagreno, kaj neniu foriradis ne varmigiĝinte ĉe lia varma koro. Kaj kvankam li sciis kaj sentis, ke kun ĉiu parteto de fordonata ora radio li perdas unu guton de sia vivo, tamen neniam al iu li refuzis je sia konsolo aŭ helpo.

Sed, kiel antaŭdiris genio, homoj, forirante kun danko, rapide forgesadis lin, kaj aliaj, kiuj ne bezonis lian varmigon, mokis lin kaj insultadis.

Tiel iris tagoj, monatoj, jaroj... Fine, en doloranta, malforta koro de tiu ĉi neordinara homo restis nur kelkaj gutoj de vivo, kaj tiam li ree venis sur konatan pinton de borda ŝtonego kaj ree plendis al ĉielo kaj ploris:

— Ho, bona genio! — diris li: — vi donis al mi oran radion, kiu havas sorĉan forton konsoladi kaj varmigiĝi ĉiujn suferantojn kaj plorantojn. Kiam mi estis juna kaj forta, mi sentis feliĉon, ke tiu ĉi radio eliras el mia koro; sed, dum pasado de jaroj, mi vidis, ke homoj estas pli malbonaj, ol mi supozis antaŭe... Ili deziras ne amon, sed monon; ili ĉion mezuras per mono kaj en iliaj okuloj ĉio havas indon nur tra mono. Al neniu petinta mi rifuzis konsolon kaj helpon, sed ĉiuj estis fremdaj por mi!... Kaj jen, mi fordonis al homoj tutan varmon, tutan forton de mia koro, preskaŭ tutan vivon kaj mem restis maljuna, sola, forgesata... Ĉu vere ne ekzistas en mondo parenca al mi animo, kiu min komprenus kaj amus?

Kaj ree, kiel en unua nokto, al li alflugis radiluma genio kaj diris:

— Mi aŭdis kaj komprenis vian plendon, ĉar ĝi estas justa. Vi estas homo kaj nenies homa animo povas vivi tute sola inter aliaj homoj. Kaj mi venis por ke doni al vi novan konsolon: jen, iru sur tiu ĉi vojo de *Espero*, kie vi trovos multajn homojn, egale kun vi sentantajn kaj pensantajn, kiuj laboras por vastigi esperon, ke venos iam tempo, kiam ĉiuj homoj fariĝos fratoj kaj komprenados unu alian. Iru kaj laboru kun ili! En fino de tiu ĉi vojo vi renkontos homan animon, malfeliĉan kaj solan, eĉ pli, ol vi mem; tiu ĉi animo komprenos vin kaj donos al vi amon kaj feliĉon... Sed estu singardema! via koro estas tro malforta kaj tiu ĉi feliĉo estos kiel akra dorno, kiu mortigos ĝin!



Sed homo per fortaj kuraĝaj paŝoj jam rapidis al nova vojo. Vigle kaj fervore li laboradis, semante Esperon ĉirkaŭ si, renkontante multajn homojn, kiuj egale pensis, egale laboris, kaj tamen li estis sola inter ili...

\* \* \*

Kaj ree pasis tagoj, monatoj, jaroj... Longa vojo estis jam traŭrita, multaj semoj de Espero, disĵetitaj per lia mano, mortis, el kelkaj aliaj elkreskis floroj, kelkaj eĉ donis frukton. Kaj jen, kiam en lia koro restis nur *unu* guto de vivo, kiam li preskaŭ tute perdis kredon trovi ian parencon animon, — tiam en unu bela somera tagiĝo, en fino de vojo, li rimarkis malgrandan knabino kiu sidis sola kaj ploris.

Li eksentis, ke lia koro ree fariĝas varma kaj forta, kaj forgesinte, ke en ĝi restis nur sola guto da vivo, li fleksiĝis super knabino kaj demandis pri kaŭzo de ŝiaj larmoj.

— Ho, mi estas tiom malfeliĉa, tiom terure sola! respondis knabino: — Mi havas parencojn, amikojn, sed mi estas fremda inter ili ĉiuj. Mia koro volas ami, sed mi ne havas al kiu doni mian amon, ĉar homoj estas tro malbonaj: ili deziras ne amon, sed monon!

Kaj subite, ekrigardinte profunde en liajn okulojn, knabino ekkriis:

— Sed nun mi jam trovis parencon animon, ĉar vi estas egale sola kaj malfeliĉa, kiel mi. Donu do al mi vian amon kaj prenu mian, kaj mano kun mano ni iru per vojo de *Espero*, senlace semante ĝin inter homoj!

Kaj tiam plenumiĝis antaŭdiro de genio. Ĝoja kaj feliĉa li donis al ŝi lastan parton de sia amo kaj kun ĝi — lastan guton de sia vivo. Kaj post kelka tempo li jam dormis per eterna dormo.

\* \* \*

Pasas tagoj, monatoj, jaroj...

Kaj lia varma koro, kiu tiel forte batadis, kiu ne domaĝis fordonadi al malbonaj homoj partojn de sia varmo kaj gutojn de sia vivo, — nun malvarma kaj senmova ripozas sur pinto de mara ŝtonego, alpremita per monteto de tero kaj blankŝtona tabulo. Ĉirkaŭe regnas silento kaj malbrueco. Nur en varmega somero noktoj ree kaj ree kantas sian misteran himnon, glorantan Diecon...

Sed de tempo al tempo sur blanka tabulo de lia tombo kvazaŭ nigra makulo, senmove kuŝas malgranda knabina figuro. Sed ŝiaj okuloj ne estas fermitaj per dormo aŭ sveno, — ili estas direktitaj en profundajon de tombo; tra ŝtona tabulo kaj tero ili vidas lian mortan vizaĝon, kun haltiĝinta penso sur frunto, kun ĉarma rideto sur blankaj lipoj, kun varmega sento en lia koro... Kaj ŝiaj oreloj klare aŭdas liajn vortojn: "gardu zorgeme radion, kiun vi havas en via koro! Donu ĝin nur al tiuj, kiuj efektive estas indaj ricevi... Amu bonajn homojn, donu al ili konsolon kaj helpon, amu ankaŭ malbonajn, pardonadu ofendojn, sed staru fortike kontraŭ iliaj tentoj!" Kaj kiam knabino levigas okulojn, ŝi vidas radilumajn geniojn, kiuj laŭte kantas al ŝi:

— Jes, gardu zorgeme radion! Ĝi estas plej kara trezoro, — ĝi estas ora radio de Amo!...

A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko.





## Pri la skribado de nomoj propraj.

Sinjoro Borovko bone zorgis, ke la disputo pri tiu-ĉi demando, kiu estis metita en L. I. ne mortigu pro manko da nutraĵo. Ŝajnas, ke la diroj pri la objekto, kiuj venis, aparte el Francujo, devus konvinki kiun ajn, penantan trapensi la demandon, sed s-ro B. videble de la komenco eliris el antaŭjuĝo, nome la igo de la tezo, ne sole ne pruvita sed ankaŭ renversita: la fonetika transskribado, kiun ebligas la esperantaj sonsignoj, taŭgas al ĉio.

Denove (L. I. 1897, p. 155 en artikolo: Necesaj aldonoj) s-ro B. provis fortigi sian senesperan situacion, de li sola defenditan, per pilkĵeto de silogismoj, al kia okupo utila li invitas la "sinjorojn naciojn". Li ĝin ne devus fari, ĉar la silogismoj estas duakra glavo, kaj tiel ankaŭ tie-ĉi.

Sinjoro B. metas la silogismon sekvantan: "S-ro L. postulas por la nomoj nacian ortografion pro manko en Esp. de necesaj (laŭ lia opinio) sonoj;

Esperantisto devas scii nur la sonojn de Esp.; —

Sekve, s-ro L. postulas tian ortografion, ĉe kia esperantisto ne povas tralegi renkontitan de li nomon.

Sekve, diras mi, la unua tezo estas nevera. — Estas videbla ke la tuta demando staras sur tiu ĉi punkto. La silogismo estas konstruita aŭ vere, aŭ nevere. Ĉe unua okazo mi estas prava, ĉe dua oni devis simple montri la eraron kaj fari nenion pli".

Tiu-ĉi silogismo estas malĝuste konstruita, sed la eraro ne trovas sin tie, kie s-ro B. diras, sed anstataŭe en la subtezo: "Esperantisto devas scii nur la sonojn de Esp."

Neniu tamen volis fari tian limigon de la scio de l' esperantisto. Aŭ kiu metis tiel absurdan hipotezon, ke persono nur fariĝanta esperantisto samtempe ankaŭ fariĝas ĉionscianta lingvisto? Ne, esperantisto bezonas kiel kiu ajn, pretendanta kompreni kaj kompreniĝi, kiam li aŭdas aŭ elparolas nomojn proprajn de l' lingvo fremda, havi lernitajn la sonojn proprajn de tiu lingvo. Ĉar estu ĉiam retenita, ke nomoj propraj ne apartenas al esperanto tiel kiel ili ne apartenas al iu alia lingvo krom al tiu de la nacio ĝin parolanta. Se mi en kia lingvo ajn legas pri lando, fremda rilate tiu-ĉi lingvodistrikto, neniu do pretendis, krom eble s-ro B., ke ĝiaj nomoj geografiaj aŭ personaj apartenas al la lingvo, kiun mi legas. Kelkaj lingvoj, aparte la franca, je tiu rilato terure proprigis la proprajn privatan de l' aliaj nacioj kaj tute simple konfuzis la nomojn, kiujn oni trovis tro ĝenajn lerni. Sed tio do ne estas kaŭzo, por ke esperanto sekvu la ekzemplon malbonan.

Tio-ĉi estas, laŭ mia opinio, la ĉefa demando, kaj kiam s-ro B. pli poste en la artikolo priskribata formas la sekvantan "ultimatum": "aŭ la *nuna* gramatiko de Esp., aŭ la ortografio nacia", li nur skermas en la aero. Tiu-ĉi demando ne tuŝas esperanton, kaj neniu esperantisto per la § 9 trompiĝis, ĉar "ĉiu vorto" nature estas ĉiu vorto *esperanta*. Kaj neniu iam promesis, ke esperanto ankaŭ donos la scion de ĉiuj aliaj lingvoj apude.

Tre bedaŭrinda, sed ĉiam tiel restos tiel longtempe kiel ekzistos naciaj lingvoj. Ĉiu provo signigi per alfabeto, tiel limigita kiel la latina, la ŝanĝeman elparoladon nacian malprosperos. Kaj al ni restas nenio alia ol lerni pli aŭ malpli bone la elparoladon de l' formo difinite skribata. Ĝin penantaj ni tamen ne devas ligiĝi per provo de l' alia fari fonetikan transskribadon, provo, kiu, esceptita eble la signigo fonetika pure scienca, ne atingos rezultojn kompareblajn je tiuj de nia imitpovo. Per tio mi ne diras, ke, escepte,



informo ĉirkaŭa inter krampoj ne povas esti utila. La akcento almenaŭ devas kompare facile povi distingigi.

La skribado nacia do estu netuŝita, kaj tio koncernas, se eble, ankoraŭ pli precize la nomojn personajn, kies la posedrajto estas ankoraŭ pli difinita ol la posedo de l' nomoj geografiaj. De kio historiaj nomaj ne estas escepto. Kial ŝteli de persono post la morto?

La efektivigado de la opinio, kiun mi nun elparolis, estas demando, kiu tuŝas ne sole esperanton sed egale ĉiun lingvon, ĉe kiu la alfabeto latina estas uzebla.

Ankoraŭ unu kaŭzo ekzistas, por ke esperantistoj ne malvivigu, ne barbarigu nomojn proprajn. Estas la timo je la rideto de l' publiko, kiu do estas unu el la plej danĝeraj armoj, uzeblaj de la kontraŭuloj, kaj kiu povas deteni personojn de la konatiĝo kun nia lingvo, alie eble fariĝita por ilia kaj nia utilo. Eĉ en mia malgranda sperto mi observis tiajn simptomojn ĉe la vido de ekz. "Ŝekspir". Antaŭ lingvo faranta tian vandalismon ili levetas la ŝultrojn kaj — foriras.

Do ankaŭ ni esperantistoj konservu la regulon universalan de la skribado ortografia de la nomoj propraj. La demando ne tuŝas la esencan de l' esperanto (male: ĝi eble povus esti trovita pli-malpli neŭtrala) kaj nenion aligas de ĝia gramatiko. Se esperantisto ne scias la elparoladon de tiu aŭ alia nomo geografia, al li nur restas plenigi tiun-ĉi mankon, se li ĝin volas kaj povas. Egale bona esperantisto li tamen estas. Precize kiel mi pretendus scii la svedan lingvon, ankaŭ se mi ne scius (kio nun okazas) ke la anoj de l' ŝtato Illinois elparolas tiun ĉi francan adjektivon (ĉirkaŭ) Ilináis kaj ne Ilínoa aŭ I'linoj\*). La vorto ankaŭ povas servi kiel ekzemplo de la neebleco signifi multajn sonojn. Kiel esperante signifi la anglan sonon "ll"? Absolute neebla.

Rilate praktikaj detaloj mi tute konsentas la proponon spertan, antaŭe venintan de s-ro Moch.

S. E. Krikortz.

## Informejo de esperantistoj.

### Ŝanĝitaj adresoj:

La nuna adreso de l' kasisto de la Klubo Esperantista en Uppsala, s-ro *Alfr. Sandborg*, estas: Järnbrogatan 26. *Uppsala*. Svedujo.

### Deziras korespondadi:

Kun alilandanoj — *Hilda Cederblad*, en *Öfverselö*. Svedujo.

Kun esperantistoj kaj esperantistinoj — *Hjalmar Bäckström*, en *Harads*. Svedujo.

Kun esperantistoj — *Gustaf Sahlin*, en *Kalmar*. Svedujo.

## Korektaĵo.

En la nomaro de abonantoj en n-ro 10, 1897, la nomo 98 *Paul Tenneson*, Paris., rue Cassini 16, estas presita "*Cenneson*" pro erara lego. Niaj Romanaj amikoj tre ofte skribas la grandan T konfuze similan kun C. La kompostisto konstante elektas por tiu ĉi signo ĉiujn literojn "eblajn kaj neeblajn kaj ankoraŭ unu" — escepte la T.

Niajn amindajn korespondantojn al la gazeto ni petas ĉiam skribi ĉion presotan tiom pli legeble, ĉar la kompostistoj de l' presejo ja ne scias Esperanton.

La red.

\*) Laŭ mia vortaro la komuna elparolado angla estas "Ilinojz", sed en la ŝtato mem oni diras "Ilinoj". — Ĉah! —  
*Remarko de l' Korekturleginto.*



## ANONCOJ.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio, Pontevedra, *Silleda*.
- „ **Portugalujo** ĉe dro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon. En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

### Depot' da semoj

de M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskva, Mjasnickaja,  
dom Staŝejeva)

vendas ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kop. en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — senpage. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj en la lingvo Esperanto.

**D**ana Viro, juna kaj klera (kontoristo) deziras lokon ie en fremda lando en kontoro aŭ en negoco. Letero signita "Dano" estu transsendita, oni petas, al la redakcio de tiu ĉi gazeto.

### Mi serĉas lokon de registo en ia rusa bieno.

Mia adreso:

Rusujo, Dmitrovsk

(gub. de Orel)

al **Ivan Mihajlovic Halcov**.

Esperante, ke amikoj esperantistoj helpos al mi, mi kore ilin dankas.

En Rusujo, gub. de Nijnij-Novgorod, 40 verstojn de la rivero Volga

oni vendas

7000 desatinojn, en tiu nombro 3000 desatinojn da kverkaro, taŭga por ekspluatado. Kosto: unu miliono kvarcent milojn da rubloj. Por informoj oni sin turnu: Moskva, Mjasnickaja, Magazeno de semoj de Mih. Ivan. Fedorovski.

### Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝ.
<i>Esperantistaro humana</i> de N. K.-G. . . . .	17
<i>Novaĵoj</i> . . . . .	18
<i>Ankoraŭ pri unu vojaĝo Esperanta</i> de A. Z. . . . .	20
<i>Kelkaj vortoj pri la ekspozicio en Parizo 1900</i> de P. Jaroslavcev . . . . .	25
<i>Internacia ligo stenografista</i> de P. Ahlberg . . . . .	26
<i>Radio de Ano</i> de A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko . . . . .	27
<i>Pri la skribado de nomoj propraj</i> de S. E. Krikortz . . . . .	30
<i>Informejo de Esperantistoj</i> . . . . .	31
<i>Korektaĵo</i> . . . . .	31
<i>Anoncoj</i> . . . . .	32